

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FR. AU 1'50 USONAJ DOLAROJ AU EGALVALORO EFECTIVIGEBLA EN BARCELONA

Redaktoroj: S. Alberich-Jofrè, Delfi Dalmau, Isidre Torrents

L'IDEAL

Quan estem massa cansats de la vida moderna, de la corbata i l'americana, i la lletra que venç demà i l'arribada del vapor demà passat, i el dividend, i el cupó, ens adonem que hi ha en el fons de nosaltres unes quantes idees simples i eternes: que al món tots som germans, que convindria que no hi haguessin guerres, que hi ha justícia i injustícia, i que el nostre deure és fomentar la primera i evitar la segona en ço que estigui a la nostra mà.

Per sentir aquestes idees tan simples, cal que adoptem una actitud d'esperit simple, i ens oblidem del xec, i del cupó, i del dividend, i del vapor. Muntar idees tan simples damunt d'elements tan complicats, és més aviat extravagant.

Es bella una columna dòrica damunt dels tres amples graons. Però ho serà igualment, a dalt de tot de la xemeneia d'una fàbrica? Aquesta és la qüestió. — JOAN CREXELLS, a «La Publicitat»

Les Discussions Gramaticals

No són molts gramàtics definidors ço que ens cal desitjar, sinó molts i forts escriptors assessorats per una única autoritat gramatical. No hi ha res més inútil ni més pertorbador que les discussions sobre els problemes pràctics de la Gramàtica en nom de la pura raó car potser la solució lògicament millor serà la que no triomfarà en l'esdevenidor de la llengua. — M. DE MÓNTOLIU, a «La Veu de Catalunya»

Pagho por Lernantoj



Regiono. Parto de lando, korpo, surfaco, karakterizata de io speciala : polusa regiono, regiono de la koro.

Nacio. Aro de homoj, loĝantaj la saman teritorion kaj havantaj komunan devenon kaj lingvon. **Nacia.** De nacio, kiu koncernas nacion: nacia karaktero, nacia lingvo. **Nacieco.** Eco, ecoj karakterizantaj nacion.

Lingvo. Tutaĵo de la vortoj kaj esprimoj, uzataj de unu nacio por kompreniĝo: la angla lingvo.

Dialekto. Variaĵo de lingvo: Esperanto ne havas dialektojn, ĉar de la komenco de sia ekzistado ĝi havas literaturon, kiu fiksas la lingvon.

(El la oficiala Vortaro de Esperanto)

Homaranismo estas instruo, kiu, ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religiano, donas al li la eblon eviti ĉian malverecon kaj kontraŭparolojn en siaj naci-religiaj principoj kaj komunkigadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neŭtrale homa sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco. (Zamenhof)



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KA
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redakcio : Carrer València, 245 - BARCELONA

XIII.^a Kongreso de K. E. F.

XII.^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

Santa Coloma de Farnés 23-25 Majo 1926.^a

La pretigo por la nuna jaro de niaj jam tradiciaj solenaĵoj, antaŭvidigas novan sukceson de nia movado en la katalunlingva teritorio.

La kvanto de premioj atingita, kaj la kvanto de verkoj ricevitaj el multaj landoj, estas kontentigaj.

La centrecio de Santa Coloma de Farnés en la teritorio de nia Federacio, kaj la privilegieco pro beleco kaj riĉeco de Naturo en Santa Coloma kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, kie troviĝas la fama banloko Orion, estas allogde decidiga.

La esperantisteco de tieaj influaj aŭtoritataj loĝantoj; la diligenteo de nia amiko Josep Turon, sekretario de la Loka Organiza Komitato, kaj multaj aliaj favoraj cirkonstancoj certigas pri sukceso de nia Kongreso okazonta la 23-25 de la proksima Majo.

La Redakcio neniel respondas (sed nur la aŭtoroj aŭ tradukintoj) pri opinioj, neologismoj, kaj aliaj detaloj de artikoloj, k. t. p., en ĉi tiu gazeto.

Principoj de Esperanto

Origino. Gramatiko. Vortaro.

Literaturo. Evoluo.

1925

(Unuafoja publikigo speciale konsentita de la aŭtoro al «Kataluna Esperantisto»).

Antaŭnoto

Regularo de la Lingva Komitato komencas jene: «La Esperantista Lingva Komitato estas komisiita por zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon».

Por konscie plenumi sian devon la Lingva-Komitato do bezonas koni la principojn, kiuj estas ne nur la reguloj kaj elementoj de la «Fundamento de Esperanto» kun la oficialaj Aldonoj, sed ankaŭ la bazoj kaj tendencoj de la nuna Esperanto ĉiutage uzata kaj senĉese kreskanta.

La samajn principojn bezonas ankaŭ ĉiuj verkantoj de lerniloj kaj terminaroj, por sin orienti en multaj dubaj punktoj, kies solvojn urĝe postulas la praktiko de nia lingvo.

Ankoraŭ pli bezonas havi antaŭ la okuloj la principojn tiuj aŭtoroj, kiuj aktive partoprenas en la unuecigo kaj pliriĉigo de Esperanto per siaj literaturaj kaj teoriaj verkoj.

Malgraŭ tiom granda graveco de la principoj, malgraŭ tio ke ili influas nian lingvon en ĝia viveco, ili tamen restas malmulte konataj, diversmaniere komprenataj, eĉ ignorataj. Unu el kaŭzoj de tiu stato estas manko de verkoj, en kiuj oni povus trovi resuman traktadon pri la lingvoprincipoj.

Zamenhof, la aŭtoro de nia lingvo, ne volis esti leĝdonanto post tiu momento, kiam la sorto de Esperanto troviĝis en manoj de la Esperantistaro. Li do estis donanta nur konsilajn respondojn pri tiu aŭ alia izola demando; kaj liaj lingvaj respondoj ne pretendis formi ian koordinitan tutajn.

Post kaj apud Zamenhof, pluraj aŭtoroj multe serĉis, kaj ankoraŭ nun penas formuli, la principojn, sen kiuj nia lingvo ne povis unuforme kaj regule disvolviĝi. Inter tiuj aŭtoroj pleje elstariĝis Boirac, Ĉefeĉ, Fauvart, Kolovrat, kaj sinjoroj De Saussure, Panel, Aymonier, Wüster. Tamen, el ĉinomitaj aŭtoroj kaj el la ceteraj nenomitaj, neniu publikigis kompletan studon pri la principoj de Esperanto. Iliaj partaj studoj ja dissemiĝis en apartaj broŝuroj, gazetaj artikoloj, privataj leteroj. La Lingva Komitato, siaflanke, ĝis nun ne povis entrepreni ian sisteman esploron pri la principoj de Esperanto, ĉar ĝi estis uzanta siajn fortojn al la revizio kaj kompletigo de la Universala Vortaro, al la esploro de kelkaj Zamenhofaj verkoj, kaj al la gardado de la fundamenta netuŝebleco. Ĉi verketo celas resumi kaj kun-

ordigi la principojn de Esperanto, kiujn la verkinto ĉerpis ĉie: en Zamenhofs verkaro, en la Fundamento, en la teoria verkaro de la esperantistoj kaj ne-esperantistoj, kaj precipe en la praktika uzado de nia lingvo — buŝa, skriba, presa.

En ĉi verketo estas montrataj dudek principoj de Esperanto. Tiu nombro 20 ne pretendas esti definitiva: iu alia povos ĝin pliigi aŭ malpliigi, jen eltrovinte pluajn principojn, jen reduktinte ilin al la malpli granda nombro. La maniero, en kiu la verkinto ilin traktis, ankaŭ ne pretendas esti objektiva kaj ĝusta. Tute kontraŭe, oni povas certe antaŭdiri ke ĉi verketo, kiel unua provo resumi la lingvoprincipojn, estos baldaŭ superirita de aliaj, pli maturaj, provoj, verkoj, eĉ ĉefverkoj.

Ĉio, kion vere aspiras la verkinto, estas nur deziro konvinki la kleran parton de Esperantistaro pri la urĝa neceso unuiĝi en la interna flanko de Esperantismo, same kiel ni unuiĝas en la ekstera flanko. Se por la lasta necesas firma organizo kun la aktiva centro, por la unua necesas klaraj principoj kun la unueciga karaktero. Se la lasta celas plifirmigi korpon de l' Esperantistaro, la unua celas plifortigi animon de la lingvo Esperanto.

Kun plena konscio pri la graveco de sia tasko, kaj kun sincera konfeso pri la nesufiĉo de siaj fortoj, la verkinto homaĝe dediĉas ĉi libreton al la samideanoj, kiuj sin oferis kaj nun sin ofertas por fari nian Esperanton inda je l' alta rolo: la lingvo tutmonda.

Ĉiuj elementoj, reguloj kaj tendencoj de Esperanto povas esti konsiderataj kiel sekvoj de ĝiaj principoj, kies nomaro estas jena:

1. Principo de origino — kultureŭropa.
2. Principo de disvastiĝo — tutmonda.
3. Principo de bazo — fundamenta.
4. Principo de ekzisto — aŭtonoma.
5. Principo de ekonomio — minimuma.
6. Principo de elparolo — fonetika.
7. Principo de akcentado — toneca.
8. Principo de skribo — ortografia.
9. Principo de propronomado — nacia.
10. Principo de radikelekto — internacia.
11. Principo de terminaro — scienca.
12. Principo de nevarieco — aglutina.
13. Principo de vortofarado — morfologia.
14. Principo de regulformeco — simetria.
15. Principo de unusignado — semantika.
16. Principo de esprimo — klara.
17. Principo de frazofarado — sintaksa.
18. Principo de versofarado — metrika.
19. Principo de konservo — tradicia.
20. Principo de kreskado — evolucia.

* * *

§ 1. Materialo, el kiu estis kreita Esperanto, apartenas al la kultura Eŭropo. Tio estas, laŭ historia ordo, la materialo de lingvoj: helena, latina, franca, itala, germana, slava kaj angla. Pro familia parenceco la sama materialo ekzistas ankaŭ en ceteraj lingvoj de la kultura Eŭropo kaj de la kolonioj. Utilas distingi en tiu materialo tri tavolojn: a) klasika vortaro de la helena kaj de la latina. b) naturscienca terminaro moderne artefarita el la helena, latina, araba, k. a. c) radikaro komuna por vivaj eŭropaj lingvoj (plus radikaro de la hindeŭropa praa lingvo).

§ 2. Kontraŭe je ĉiu nacia lingvo, kiu havas sian limitan teritorion, la lingvo tutmonda apartenas egale al ĉiuj terpartoj, kaj pro sia neŭtraleco ĝi povas esti uzata libere de ĉiuj diversgentanoj, kiuj tiel evitas tuŝi reciprokajn nacian sentemon.

§ 3. Lingvoj naciaj ekzistis dum longa tempo antaŭ ol ili estis skribataj, kaj pasis ankaŭ longa tempo inter apero de la unua literaturo kaj apero de la unuaj gramatikoj. Ĉiu lingvo natura ja estas naskita kaj vivas sendepende de la skribaĵoj, kiuj mem sur ĝi sin apogas. Alie estas artefarita lingvo kiu aperis ĝermite sub formo de la gramatiko kaj radikaro, fiksita en la unua libreto. El tiu libreto kreskis literaturo, gazetaro, internacia korespondado kaj buŝa uzado, kiuj kune formas tutmondan movadon, nomatan la Esperantismo. La libro, kiu estas nun sankciita bazo por ĉiuj Esperantuzantoj, portas titolon «Fundamento de Esperanto».

§ 4. Por esti neŭtrala, la tutmonda lingvo devas ekzisti sendepende de ĉiu aparta nacia lingvo aŭ lingvogrupo. Por esti facila ĝi devas posedi internan harmonion, t. e. havi siajn proprajn leĝojn. Tiel aperas principo de aŭtonoma ekzistado de Esperanto.

§ 5. Elspezi minimuman forton celas ĉiu, kiu volas agi por utila rezultajo. Tendenco malpleje elspezi, por atingi sufiĉan interkomprenon, penetras ankaŭ ĉiun vivantan lingvon. Se Zamenhof ne imitis la eŭropajn lingvojn en ilia komplika konjugaro, en ilia seksa genro, k. c., li tion faris por krei relative facilan lingvon. Kaj la evoluo de nia lingvo, en ĉefaj trajtoj, sekvas vojon de ĉiam pli kaj pli granda elasteco kal facileco.

§ 6. Kun la skriba materialo, komuna por kulturaj eŭropaj lingvoj, Zamenhof akceptis ankaŭ la sonojn, parte komunajn por Meza Eŭropo, parte ne tro malfacilajn por plimulto da l' kulturuloj. Se la sonsistemo de Esperanto ne estas facila por anglo, aŭ por japano, ĝi tamen por ili estas pli facila ol sonsistemo de la franca, rusa, germana, araba, ĉina, kc. Pro la granda diverseco de sonsistemoj, uzataj en la tutmondo, estas neeble trovi en ili komunajn sonojn; tial, ĉiu pretendo atingi tutmondan neŭtralan sonaron, por la internacia lingvo, estus vana. Meznombro, Esperanta sonaro estas malpli riĉa ol la nacia.

§ 7. Formale, la akcento havas nur mekanikan rolon: altiĝi antaŭlastan silabon. Esence, ĝi havas organikan sencon, ĉar pro la akcenta regulo, neniam estas akcentataj la finaĵoj: o, on, oj, ojn, a, an, aj, ajn, e, en, i, as, is, os, u, us, al, am, el, es, om, u, uj, aŭ, er. Krom la vorta, ekzistas ankaŭ la fraza akcento. Krom la akcentoj, ekzistas ankaŭ tonoj, kiuj povas havigi al frazo (aŭ al vorto) la nuancon: demandan, miran, ordonan, duban, deziran, bedaŭran, koleran, petan, k. m. a.

§ 8. Ortografio en Esperanto bazas sur teoria postulo: por unu sono — unu litero. Tial do en nia lingvo ne ekzistas sensonaj kaj plursonaj literoj, nek simplaj sonoj skribataj per duoblaj, trioblaj aŭ kvaroblaj literoj. Laŭ dua postulo de la ortografio oni skribas aparte ĉiun frazeron, eĉ kiam ĝi fonetike ligiĝis kun la najbara: (*labela sonĝo del homaro*).

§ 9. Aĵoj komunaj, kiel tero, arbo, pomo, birdo, havas diversajn nomojn ĉe diversaj popoloj. Aĵoj unikaj, kiel London, Bern, Ebro, Neva, Lev Tolstoj, Hektor Hodler, havas ĉiu sian solan nomon, kiun diversaj popoloj povas ripeti kun pli aŭ malpli granda kripligo, per tiu aŭ alia aboco. En antikva tempo, pro malproksimo kaj malzorgo, oni multe kripligis la proprajn nomojn, kaj tiu malbona nomado iomgrande daŭras eĉ nun, kiam la distancoj mallongiĝis kaj la zorgoj pliiĝis. Nuntempe, por ekz. nomi aŭstrian ĉefurbon, ni ne bezonas kolekti kaj kompari ĝiajn kriplitajn nomojn: Vienne, Vienna, Vjena, Videju, Beĉ, ktp.; sufiĉas nin turni al tiu urbo mem, kaj preni ĝian realan nomon, por poste ĝin transskribi per Esperantaj literoj. Ne gravas, se ĝia nuna nomo (Wien) estas ankaŭ kriplaĵo de iu praa vorto, kiun la romanoj siatempe kripligis en «Vindobona»; sufiĉas ke nunaj vianoj ĝin nomas tiel. Per sama maniero ni povas ekz. skribi Ĵan, Ĝon, Johan, Jan, Jon, Jovan, Ĝovani, Jvan, lasante al ĉiu nacio ĝian propran koloron, anstataŭ senkolorigi ilin ĉiujn per pseŭdo-internacia nomo «Johano». Unu el universalaj geografiaj kongresoj rekomendis uzi sur la sciencaj kartoj nur lokajn, originajn, nomojn, skribante ilin per unuforma alfabeto. En Esperanto ni povas nur plenumi tiun rekomendon.

P. STOJAN, L. K.

(daŭrigota)



Pro... kaj Por...

Nia bona samideano kaj bona profesoro de «Radio Barcelona», Artur Domènech, feliĉe resaniĝis kaj reprenis sian kurson tre elokvente. La kompilinto de «Kataluna Antologio», Jaume Grau Casas, tre lerte paroladis ankaŭ ĉe «Radio Barcelona» pri la nova granda verko en Eaperanto.

XII^a Internaciaj Esperantistaj Floraj Ludoj

LISTO DE PREMIOJ

(fino)

XXXII. — Premio de S-ro. Joaquim Trias de Santa Coloma de Farnés: skatolo da frandaĵoj, specialaĵo de la firmo. Temo: Laŭvola.

XXXIII. — Premio de S-ro. Francesc Trias de Santa Coloma de Farnés: skatolo da frandaĵoj, specialaĵo de la firmo. Temo: Laŭvola.

XXXIV. — Premio de S-ro. Esteve Monegal de Barcelona: 50 pesetoj Temo: Louvola.

LISTO DE VERKOJ RICEVITAJ

(Daŭrigo)

14. Pax Tibi, Marce, Evangelista meus. — 15. Mallorko. — 16. Esperantujo. — 17. Vojaĝanto. — 18. Merlin. — 19. Trokadero. — 20. Brilu mia stel'. — 21. Amiko de la Floraj Ludoj. — 22. Amu vian patrujon. — 23. Tragedio. — 24. Mieux vaut tard que jamais. — 25. Lumo, amo, vivo. — 26. Mia recepto. — 27. Poemo sen rimoj. — 28. Modesta konsilanto. — 29. Modesta batalanto por rajto kaj honoro. — 30. Kismeto. — 31. Amo miraklojn okazigas. — 32. Ankro. — 33. Mi diris, penu, hom', kaj firme fidu! — 34. Ni proponas, vi disponas. — 35. Mia somero sonoras. — 36. On y soit qui mal y pense. — 37. Lingvo estas fosilia historio. — 38. Procède et semper - Italia - semper! — 39. Cyrano. — 40. Mitologio. — 41. Blankaj birdetoj. — 42. Havu sunon en koro. — 43. Ondetoj. — 44. Kiu amas sian kunhomon amas Dion. — 45. Ereto. — 46. Tagiĝas en la mondo. — 47. Mi riskis ĝin. — 48. Serĉante ni lernos. — 49. Junularo. — 50. La vivo ne estas plej valora posedaĵo... — 51. Vian mizeron fabeligu! — 52. Ni semas kaj semas. — 53. Printempa dezir', aŭtuna sopir', esperinspir'.

Peto. — La aŭtoro de la verko devizita «Mieux vaut tard que jamais» estas petata tuj sendi fermitan koverton entenantan liajn nomon kaj adreson laŭ indikas la Regularo de la Floraj Ludoj. — Ankaŭ oni petas la aŭtoron de la 3 verkoj ricevitaj: «Kio en la koro sidas, la vizaĝo perfidas». «Plej granda potenco kuŝas en la komenco» kaj «Bone tiu sidas, al kiu la sorto ridas», sendi plej rapide la originalojn al la Sekretario, ĉar nur oni rivevis la fermitan koverton kun la nomo kaj adreso. — Lastthore ĉiuj alvenis.

DANKON

Ni deziras esprimi al ĉiuj esperantaj gazetoj reprezentaj la liston de premioj kaj temoj por la XIIaj Floraj Ludoj. Per tiu represo ili certe atentigas siajn legantojn, kaj decidigas kelkajn partopreni la konkursojn por atingi premiojn kaj gloron. Ni speciale ŝatas la bildon pri Floraj Ludoj en la XV jarcento publikitan de «Espero Katolika», kaj tre dezirus ĝentilon de tiu gazeto permesi al la nia ankaŭ publiki ĝin per sendo al ni de la koncerna klišo, kiun ni poste danke resendus.

El Objektivaj Recenzoj pri la «Kataluna Antologio»

(El «*Esperanto*» de U. E. A.)

«Ofte ni plendis pri malgraveco kaj maldikeco de esperantaj presaĵoj. Kataluna Antologio feliĉe surprizas per la malaj kvalitoj. Ĉiel laŭdinda ĝi estas. Belega libro, riĉa enhavo, neta preso sur luksa nurlina papero, vera libramanta eldonaĵo, bibliotek-ornamo, ties fiero kies posedaĵo. Ne nur la eksteraĵo estas plaĉa; ne malpli valora la teksto mem. Serioze scienca en la historiaj, lingvaj literaturaj studoj, kaj ankaŭ ĉarma legaĵo en la antologia parto, aro da poezioj, skizoj, humoraĵoj, noveletoj. La kompilinto kaj verkinto de la plej multaj tradukoj versaj kaj prozaj, S-ro. Jaume Grau Casas, konfesas, ke li oferis multjaran laboron por realigi sian celon. Li sinceran gratulon meritas de la esperantistaro, kiel ankaŭ liaj samnaciaj kunhelpintoj. Amo al patrujo kaj deziro diskonigi ĉien ĝian spiriton kaj literaturan trezoron, fervoro al Esperanto, ilo de internacia reciproka kompreno kaj ŝato, jen ambaŭ sentoj, kiuj instigis, kuraĝigis la ĉeflaborinton. Lia moto estis: «Ni volas honori la lingvon de niaj prapatroj per la lingvo de niaj pranejoj».

G. S.»

(El «*Heroldo de Esperanto*»)

«Kio? Literatura verko, volumo pli ol 400-paĝa? Ĉu vere? Ĉu vi surprizite ne diris tion, fidele «Heroldano», leginte la titolon? — Efektive, ĝi ekzistas, ĵus naskiĝis, verko inda je nia plej serioza atento kaj je nia senlima admiro. — Antologio! Nur antaŭ nelonge mi parolis ĉiloke pri antologioj (bulgara kaj pola antologioj) kaj opinias ripeton superflua. Sed mi certigas vin, ke la K. A. estas kaj estos senrivala laŭ ĉiuj vidpunktoj. — El du fontoj fluegas abunde la nektaro de arto kaj poezio en nia Esperanto-literaturo: Budapeŝt kaj Barcelona.

... Grau Casas kaj aliaj katalunaj samideanoj faris la tradukojn senescepte bonegaj, artismaj. Menciinda estas nepre la unuakvalita papero kaj la senriproĉe klara preso, kiu ne lacigas la okulon. — La librego ne estas multekosta rilate al ridinde etaj broŝuroj, kiuj svarmas en nia literaturo kaj kies elveno ofte estas duberaĵta. La prezo absolute ne egalvaloras la gigantan laboron de la kompilinto kaj de la fervoraj kunhelpantoj: tre modesta ĝi fakte estas. — Ni elkore danku niajn katalunajn fratojn por ilia faro kaj aĉetu la verkon. La servo, kiun ili faris al sia patrolando kaj al nia Esperantujo, trovos brilan rekompencan.

M. BUTIN, L. K.»

Pro... kaj Por...

«*Paco kaj Amo*» *translokiĝis* al carrer Planeta angulo Plaça del Sol, en Gràcia. La nova sidejo estas granda kaj tre deca por efika agado per kursoj kaj kunvenoj. Nian sinceran gratulon al la ebligintoj de la progesa ŝanĝo. Nian fervoran deziron por prospero de novsideja agado de la longtempe vigla «*Paco kaj Amo*».

Nia malamika iu klopodis malpermesigi la okazigon de nia Kongreso 1925 en Majorko, sed nia brava pioniro Narciso Bofill venkis nian malamikan iun, kaj nia XII^a okazis plej brile. Nia malamika iu insultis nin en la Kongreso en Kordovo, kaj lasttempe nia malamika iu punigis nin al pago de 500 ptoj. pro enhavo en nia oktobra numero de K. E. — Ni petas niajn amikojn sendi al ni plej baldaŭ monhelpon por repago al samideano antaŭpaginta tiun sumon, kaj ni kompatas nian malamikan iun por la malsamideana sukceso kontraŭ nia gazeto.

Homaranismo estas instruo, kiu, ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religiano, donas al li la eblon eviti ĉian malverecon kaj kontraŭparolojn en siaj naci-religiaj principoj kaj komunikigadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neŭtrale homa sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco. (Zamenhof).

Pri Emilio Gastón Ugarte. — Zaragoza, 6 jan. 1926. — Sro. Direktoro de «*Kataluna Esperantisto*». — Barcelona. — Estimata Sinjoro. Du vortojn nur por esprimi al Gazeto miajn dankojn pro la nekrologa artikolo pri S-ro. Emilio Gastón Ugarte, nia neforgesebla profesoro, mia amata amiko dum niaj tutaj vivoj. La K. E. F. perdis sian honoran membron kaj plej bonan amikon. La A. E. F. perdis sian animon; mi perdis fraton. — Via, Manuel Maynar Barnolas».

E S P E R A N T I S M O

«Ne strange ke akompananta la eltrovon de la kuriozemo estu la vigeleco de la emo pligrandigata de la konvinkigo pri la profito signifanta por ĉiuj popoloj posedi interkomprenilon, kiu, *kune kun la lingvo kaj literaturo naciaj*, metus ilin je tuja rilato kun tuta la Homaro.

DRO. KORTEZO»

«A este descubrimiento de la curiosidad, no es mucho que acompañara la viveza de la afición, reforzada para ello por el convencimiento del provecho que significaría para todos los pueblos el poseer un instrumento de comunicación que, *agregado a su lengua y literatura maternas*, les pondría en inmediata relación con la humanidad entera.

DR. CORTEZO»

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ



TRIA EPOKO - JAROJ I^a KAJ II^a : 1925

TABELO DE LA ENHAVO

- Alberich Jofrè, S.*: Tridek-sepa datreveno de Esperanto. Pripensoj kaj komentarioj, p. 42. — Sekretaria Raporto pri la XI Internaciaj Floraj Ludoj, p. 162.
- Apptebaum, J. D.*: Mia naskiĝurbo kaj ĝia foirplaco, p. 241.
- Baghy, Julio*: Ĉe Samovaro, p. 253.
- Berger, Josep*: La Amo al la Birdoj, p. 74. — Venĝo, p. 212.
- BIBLIOGRAFIO**: Jofrè, p. 90. — J. G. C., p. 90. — M. S., p. 69. — Saljo, p. 45, 67, 89, 142, 234, 266. — P. C. 236.
- Bofill, Narciso*: La Proksima Kongreso de K. E. F., p. 81. — Malferma Kunvido de la XII Kongreso de K. E. F. Parolado, p. 154.
- Brunet, Charles*: Pli ŝatas mi..., p. 140.
- Cart, Th.*: Antaŭparolo al lernolibro, p. 130. — Aŭtoritata Opinio, p. 261.
- D. D.*: Adiaŭo de nia redaktoro, p. 24. — Mi dankas, p. 231.
- Dalmau, Delfi*: Klare kaj Lojale, p. 54. — Parolado okaze de la XII Kongreso de K. E. F., p. 157. — La XVII Universala Kongreso de Esperanto, p. 206. — Pro... kaj Por..., p. 237.
- Domènech, Artur*: La Naskiĝo de Amo, p. 34. — Viaj Okuloj, p. 165. — III Iberia Kongreso Esp. en Kordovo, p. 225.
- ESPERANTO-MOVADO**: p. 46, 48, 224.
- Fethke, E.*: Eloĉ, p. 37.
- FAJRETOJ**: p. 70, 92, 104, 114, 124, 133, 152, 202.
- Gili Norta, Joan*: La Konferencoj en Parizo, p. 195.
- Grau Casas, Jaume*: Sekretaria Raporto pri la X Internaciaj Floraj Ludoj, p. 9. — Angel Guimerà, p. 61. — Maro kaj Ĉielo, (trad. el Angel Guimerà) p. 64. — La Kiso sur la okuloj, (trad. el Gabriel Alomar) p. 73. — La kataluna verkisto Eugeni d'Ors kaj lia verko «Glosaro» p. 98. — Al la gvidantoj de U. E. A., p. 136. — Por la «Kataluna Antologio», p. 141. — La Paŝtistineteto, (trad. el M. Costa i Llobera) p. 167. — Mia Fianĉino, p. 252.
- X INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ**: Raporto pri la festo, p. 8.

- XI INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ: Alvoko, p. 55. — Listo de Premioj, p. 82. — Listo de verkoj ricevitaj, p. 84, 111, 129. — Verdikto, p. 147. — Raporto pri la festo, p. 162.
- XII INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ: Alvoko, p. 229. — Premioj kaj temoj, p. 262. — Verkoj ricevitaj, p. 263.
- III IBERIA KONGRESO ESPERANTISTA, p. 200.
- Jung, E.*: El H. Heine, trad. p. 253.
- Katocsay, Kolomano de*: Kisoj, p. 12. — Kanto de Vagabondo, p. 77. — Prezidanta parolado de la XI Internaciaj Floraj Ludoj, p. 184.
- XI KONGRESO DE LA K. E. F.: p. 1.
- XII KONGRESO DE K. E. F.: p. 53. — Programo, p. 126. — Kongresaj sciigoj, p. 127. — Solena Momento. Ni amase kongresu, p. 137. — Informoj kaj sciigoj, p. 144. — Raporto, p. 153.
- XIII KONGRESO DE K. E. F.: p. 229.
- Krestanoff, Ivan H.*: Bulgaraj Popolaj Kutimoj, p. 78, 110.
- Le, Curt*: Plenumo de l' devo, p. 112.
- Migliorini, Bruno*: Kontribuajoj al Esperanta Etimologio, p. 119.
- NEKROLOGIO: p. 47, 72, 87, 116, 268.
- Osmond, Emma L.*: Impreso, p. 219.
- PAGHO POR LERNANTOJ: p. 66, 88, 109, 132.
- PRO... KAJ POR...: p. 218, 232, 251, 253, 260, 261, 263.
- REDAKCIO DE KATALUNA ESPERANTISTO: La nova vida de K. E. F., 25. — Feliciau Novjaron, p. 49. — Alvoko al la Katalunaj Esperantistoj. Pri nia reorganizo, p. 50. — Novaj Perspektivoj, p. 86. — Al Palma en majo, p. 97. — Radiotelefonia Parolado en Barcelona Stacio, p. 117. — Klariga Noto de komprenema Samideano, p. 138. — Pri la «Kataluna Antologio», p. 194. — Atentu, p. 204. — El Alparolo de Prof. Cart, p. 211.
- Schmid, Jakobo*: Mono ne feliĉigas, p. 80.
- Shoor, Jan van*: Je l' nova jaro, p. 240.
- Solá, Marian*: Raporto pri la XVI Universala Kongreso de Esperanto, p. 28. — Eksterordinara kunsido de K. E. F., p. 85. — Sekretaria Raporto, p. 158.
- Ŝirjaev, I.*: Mistera Fraŭlino, p. 254.
- TRA LA GAZETARO: p. 151, 236.

Pri la Kataluna Lingvo. — «... pri via hejmlingvo mi komunikas du citojn, eble nekonatajn por vi. — En nov-aperinta lingva studo de konata romanlingvisto W. Meyer-Lübke «Das Katalanische». Seine Stellung zum Spanischem & Provenzalischen sprachwissenschaftlich & historisch dargestellt. Heidelberg. 1925. Winter. XII + 191 pp. la aŭtoro klarigas per historio la fakton ke evoluo de l' kataluna estis pli proksima al la provenca ol al la iberia. En nuna kataluna teraro la antikvroma koloniigo estis densa & la kamparo mem romanigis, dum en Iberio nur la urboj romanigis sed la kamparo evoluis sendepende, do alie ol la kataluna popolo. En granda verko «Les Langues du Monde» par un groupe de linguistes sous la direction de A. Meillet & M. Cohen. Paris. 1924 XVI + 811 pp. + 18 cartes. En tiu «lasta vorto» de l' lingvistiko mi trovas: «On peut ramener les différends parlés romans aux groupes suivants: a) groupe *italien*, b) gr. *provençal*, c) gr. *espagnol*... anciens textes sont de 1145 (charte d'Oviedo) & 1155 (Fuero de Avilés), d) gr. *catalan*, qui outre la Catalogne comprend la Valence & les Baléares. Le plus ancien texte est de 1171 (du monastère Roda). e) gr. *portugais*... una charte de 1192. g) h) i) groupes: *rhéto-roman* ou latin, *dalmate, roumain, français*». Do, inter la 9 grupoj nov-latinaj la kataluna okupas memstaran lokon. Mi notis: keltdevenaj: *blat*: franca *blé*: slava *biljé*; *fang*: fr. *fange*: sl. *bagno*: Tiajn keltdevenaĵojn oni nomas «bas-latin» sed ili ne estas latinaj...» — P. STOJAN.

Lastan vintron la esperantistoj de la ĝemelurboj Minneapolis kaj St. Paul, Minnesota, Usono, dissendis sian unuan programon en Esperanto pere de la potencia radio stacio WCCO. La rezultato estis tiel bonega ke la estraro de WCCO volonte konsentis ke ni dissendu alian programon. Ĝi okazos la 12an de Februaro, je la datreveno de la mondfama Usona eksprezidanto Abraham Lincoln, kaj estos do Lincoln'a programo. La programo komencos je la 11:30 horo nokte. Oni elektis malfruan horon por ke la aero estu pli libera kaj por ke oni estu pli certe aŭdata ne nur en tuta Usono sed ankaŭ en Europo. WCCO, Ora Medalo Stacio, estas propraĵo de Washburn Crosby Kompanio, muelistoj de la fama Gold Medal Flour (Ora Medalo Faruno). La funkciadon de la stacio kontrolas 500 subskribantoj de Minneapolis kaj St. Paul. WCCO, kun potenco da 5,000 uatoj, estas unu el la 14 plej potencaj stacioj en Usono. La ondlongeco estas 416.4 metroj. Ni urĝe petas ĉiun leganton ke li nepre skribu al WCCO, Gold Medal Station, Minneapolis, Minnesota, U. S. A., pri lia sukceso aŭ malsukceso en la aŭdado de la programo. La esperantista movado tie ĉi estas nova sed tre vigla. Vi montru la vivecon de la movado ĉe vi per nepra letero aŭ karto.

Al la Redakcioj, Organizaĵoj kaj Unuopuloj-Esperantistaj de tutmondo!
— Estimataj Samideanoj! La ĝisnuna aranĝado de multnombraj etaj lokaj Ekspozicioj Esper. estas ĉies fortojn tro absorbanta kaj kaŭze de ilia lokeco ne tro efika. Por tion eviti, la «Komitato de Esperanta Ekspozicio» en Lublin, Polio, Eŭropo, post interkonsento kun plejmulto de pollandaj Esp.

Organizaĵoj konstituigis kiel *Tutlanda migranta Ekspozicio Esperantista* okazanta en Januaro ĝis Marto 1926 — kaj petas je alsendo de ĉiulandaj gazetoj, broŝuroj, libroj, presaĵoj, poŝtkartoj ktp., sed precipe de ĉiuj dokumentoj de adaptado de Esperanto en praktika vivo: scienco, pedagogio, komerco, arto, sporto, sociaj kaj religiaj movadoj ktp. en postmilita periodo. Ĉiujn sendaĵojn, por kiuj ni plej kore dankas, ni petas sendi al la adreso: Seweryn Przybyszewski. Vic-del. de UEA., Lublin, Graniczna 3. Polio, Eŭropo. Ĉiu sendinto ricevos koncernen kvanton da belaj, ilustritaj poŝtkartoj kun popoltipoj kaj vidindaĵoj de Polio.

Al niaj Grupoj, abonantoj kaj izolaj membroj, ni esprimas la peton ke ĉiuj pagu kaj pagigu la kotizojn al K. E. F. plej akurate. Grupaj kotizoj estas po dek ĉiumonataj centimoj po grupano. Individuaj kotizoj estas po ptoj 3'50 jare. Jarabonoj al «Kataluna Esperantisto», 6 ptoj por enlandanoj, kaj 6 sv. fr. aŭ egalvaloro efektivegebla en Barcelono, por eksterlandanoj. Se por faciligi la sendon de pago vi aldonos helpmonon, vi estos dankinda kaj ni povos agadi pli multe por nia kara afero. Bonvolu adresi ĉiujn pagojn al Sro. Kasisto de K. E. F., C. València 245. — Barcelona. La membro-abonantoj de K. E. F. kaj precipe la Grupoj estas petataj utili la helpon de nia Federacio por propagando kaj lernado de Esperanto. Tiucelajn petojn bonvolu sendi al la dirita adreso al la nomo de Sro. Sekretario de K. E. F. — Ĉiuj Grupoj kaj individuaj K. E. F.-anoj ankaŭ estas petataj sendi interesajn notojn Pro... kaj Por... al la direktanto de «Kataluna Esperantisto», C. València, 245. — Barcelona.

Tre prave nia samideano en Bilbao Sro. Victor O. Allende diras en «La Suno Hispana»: «En diversaj okazoj mi vizitis esperantistajn grupojn en Francujo, Germanujo, Anglujo kaj Hispanujo. Ordinare en la grupejo oni parolas nacian lingvon. La grupanoj profitus sendube pli bone la tempon se ili parolus Esperanton; sed, bedaŭrinde, tion oni ne faras. Same okazas kiam kunpromenas du esperantistoj. Ili parolas, ĝenerale, nacian lingvon.» La Barcelonaj loĝantoj estas petataj ĉeesti ĉiudimanche la interparoladan kalfkunvenon en Restaurant Moritz, Plaça Sepúlveda, de la sesa ĝis la oka vespere por praktikado de Esperanto. Niaj plej lertaj samideanoj ordinare konsistigas tiun dimanĉan kunvenon tre praktikan por alkitimiĝo al interparolado en Esperanto.

Multaj Grupoj en nia teritorio havas fiksjajn datojn por okazigo de festoj. «Lumon» en Terrassa famiĝis pro sia kristnasktaga festo. En la lastpasinta Decembro tiu festo okazis tre sukcese dank' al elokventaj paroladoj de niaj konataj oratoroj Solà, Oliart kaj Girona en tiu urbo.

Bonegan impreson faris en la rondoj de katalunaj verkistoj la granda esperanta libro «Kataluna Antologio». — Profite de tiu fakto, laŭ iniciato de K. E. F. kaj efika kunlaboro de la Barcelona Esperanto-Societo ĵus fondita, estas organizitaj ekspozicio de libroj kaj gazetoj esperantaj kaj kurso de nia kara lingvo en la Barcelona Ateneo.

En Lirto sukcese okazis «Tria Regiona Kongreso de la Federaci6n Esperantista Levantina» dank' al klopodado de Sroj, Piñ6, Serra, Marzal kaj Albiol, la pasintan novembron. — Raporte diras «La Suno Hispana», decembra numero: «Malfermite la kunvenon, per akklamado estis elektitaj Prezidanto tiu de la loka komitato Sro. Johano Francisko Serra Ferrando, agante kiel Sekretario tiu de la Federacio Sro. Piñ6 kaj helpantoj Sroj. Caplliure kaj Sofer Valls. — Post legado, de la antaŭa akto, okazinta en Cheste, okaze de la Dua Regiona Kongreso, estis aprokata unuanime. — Tuj poste Sro. Piñ6 diris sendetalan raporton pri la faktoj okazintaj post la kongreso de Bilbao, pri la eksigo prezentita de la prezidanto de Iberia Esperantista Konfederacio Sro. Benigno de Luna, pri verko de regularo de Madrida Grupo por projektata Hispana Esperanta Asocio, pri disigo de Konfederacio kaj pri konkludoj balotitaj en la nacia kongreso de Kordovo, en lastepasinta Majo, okaze de legado de regularo de nova societo, kiun klarigis al la ĉeestantoj rilate al la artikoloj pli esencaj kaj studindaj. — Sro. Prezidanto envojigis la diskutadon proponante ke, tial ke en la Kordova Kongreso oni ne alvenis en konkretan konkludon kaj en la kongreso kunvenonta en Madrido dum Majo 1926, Federaci6n Esperantista Levantina rajtas difini du reprezentantojn siajn por interveni en la fondo de H. E. A. oni nomu de nun tiajn du reprezentantojn, donante al ili plenan rajton por baloti tie la plej konvenan al propagandaj esperantistaj interesoj en Hispanujo kaj de la bona funkciado de nia Federacio. — La prezidanto demandis ĉu la Kongreso preferis malfermi diskutadon pri tuta projekto de regularo de H. E. A. aŭ po artikoloj fariĝinte tuj viva diskutado pri la motivoj devenigintaj la verkon de dirita regularo kaj fondon de nova asocio, kiun partoprenis Sroj. Pérez Requena kaj Mânhez, kiuj montris sian malĝojon pro la faktoj okazintaj, bedaŭrante ke ne konsultinte la volon de federaci6j oni kreis novan organizaĵon malestimante alian, kiŭ tiom da penadoj kaŭzis por sia kreado». — Okazis ankaŭ belaj festoj, paroladoj, akcepto ĉe aŭtoritatuloj, k. t. p. Por Esperanto ĝi estis efika, kaj tial ni gratulas la organizaĵintojn kaj ceterajn partoprenintojn.

En Sevilla ankaŭ revigliĝas la movado por Esperanto. — La katalunaj esperantistoj profunde deziras la disvastigon de Esperanto en la tuta Hispanujo.

Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado. — Sidejo: 12 Bd. du Théâtre, Genève. — Adreso por korespondaĵoj. — Ni petas, afable atenti pri tio, ke ĉiu oficiala korespondado de nia komitato estas farata de nia sekretario. Ĉiuj korespondaĵoj do devas porti la supre indikitajn adresojn. Ni tre petas ne adresi al personoj (krom privatletero), sed simple al nia komitato. — Oni ankaŭ ne sendu al ni sendaĵojn, destinitajn por UEA, ĉar nia laboro estas tute apartigita.

Naciaj Societoj en KR kaj Fakorganizaĵoj. -- Konforme al § 7 de la Organiza Statutaro nia komitato prenis sur sin ĉiujn eksterajn laborojn de KR.

Ni do petas, ke la anoj de KR kaj la fakorganizoj interrilatu kun *nia komitato* pri ĉiuj propagandaferoj ktp.

Cirkuleroj. — Fine de decembro ni dissendis 2 cirkulerojn al ĉiuj naciaj societoj, anoj de KR kaj ĉiuj fakorganizoj. Tiuj, kiuj pro iu kaŭzo ne ricevis la cirkulerojn, bonvolu tuj sciigi nin. Ni ankaŭ petas pri afabla rapida sciigo de eventualaj adresŝanĝoj.

Korespondantoj. — Ni estos tre dankemaj pri sciigo de adresoj de samideanoj, kiuj per jara pago de 100 sv. fr. povus deziri fariĝi korespondanto de I. C. K. — Ĝis 31a decembro la sekvantaj samideanoj fariĝis korespondantoj: (laŭ aliĝdato). 1. S-ro. D. Buchanan, Rothsay. 2. S-ro. Koogecu Nišimura, Ajabe. 3. S-ro. Teizo Eisaki, Fukuoka. 4. S-ro. J. Borel, Vauxmarcus. 5. F-ino. G. Wickham, St, Basile. 6. F-ino. Offerhaus, s'Gravenhage. 7. S-ro. J. Mangada-Rosenörn, Madrid. 8. S-ino. R. Weinberg, Kraków. 9. F-ino. E. M. Milner, Leek. 10. S-ro. D-ro. Crowley, Welwyn-Garden-City. 11. S-ro. D-ro. H. Arnhold, Dresden. 12. S-ro. D-ro. E. Loth, Pabjanice. 13. Delfi Dalmau, Barcelona. 14. D-ro. Vogt, Stuttgart. 15. S-ro. v. Frenckell, Dresden-A. 16. J. Merchant, Sgeffield. 17. S-ino. A. Morris, New-York. 18. S-ro. E. Legrand, Montevideo. 19. S-ro. D-ro. Fulda, Berlin. 20. S-ro. Ed. Stettler, Bern. 21. S-ro. B. Kötzt, Leipzig. 22. S-ro. Chas. H. Edmonds, Welwyn-Garden-City. 23. S-ro. J. J. Boutwood, Hastings. 24. S-ro. A. J. Adams, Hastings. 25. Chas. M. Cather, Port-Said. — NARCISO BOFILL, Palma de Mallorca.

Akademio. — Estraro de la Akademio por la jaroj 1926-1927-1928 (laŭ la lastaj elektoj). — Prezidanto: Prof. Th. Cart. — Vicprezidantoj: S-ro Warden kaj D-ro Dietterle. — Direktoroj de la tri Sekcioj: Prof. Grosjean-Maupin. D-ro Lippmann, D-ro Privat.

En la lasta ĝenerala kunsido okazinta ĉe «Esperantista Klubo Palma» oni elektis la jenan direktan komitaton: Prez. S-ro B. Font; Sekr. S-ro. A. Nadal; Vicskr. S-ro. J. Barceló; Kasisto S-ro. N. Terrasa; Bibliot. S-ro. F. Molinos; Voĉdonantoj 1^a S-ro. J. Matas, 2^a M. Barrios, 3^a S-ro. G. Cortada. — La klasoj de Esperanto gvidataj de la honora prezidanto S-ro. Narciso Bofill sukcese daŭras ĉe la nomita Grupo, kies anaro multe pli multigis de la lasta kongreso de «Kataluna Esperantista Federacio» okazinta en tiu ĉi urbo. Ankaŭ nia movado disvastiĝis tra la tuta insularo Majorko; en kelkaj el ĝiaj vilaĝoj oni fondis Grupon esperantistan. — La Sekretario, A. Nadal.

«Zaragoza 21^a-1-26^a—Kataluna Esperantisto—Barcelona. — Estimataj samideanoj: La 10^an de la nuna monato okazis ĝenerala kunsido de la esperanta Societo «Frateco» prezidita de S-ro. V. Loren, kiu esprimis antaŭ la ĉeestantoj sian sinceran ĉagrenon pro la morto de S-ro. E. Gaston neanstataŭebla prezidinto de nia Societo, kaj fervora esperanta pioniro. — Sama malĝoja sento regas ĉiujn kunvenintojn. — Oni decidis danki al la gazeto «Kataluna Esperantisto» pro la esprimo de ĝia kondoleenco okaze de

tiu malfeliĉaĵo. — Poste estis elektita nova komitato kies membroj estas: Prez. S-ro. J. Martínez; Vicprez. Pastro V. Loren; Sekr. S-ro. J. Orós; Vicsekretario, S-ro. E. Artigas; Kasisto S-ro. T. Rubio; Vickas. S-ro. R. Gaston; Voĉdonantoj: S-roj. M. Maynar, J. Larruga, J. M^a Julve. — La nova komitato sendas al vi sian respektplenan saluton restante sincere kaj samideane via. — La Sekretario, J. Orós».

Nia malnova amiko, kataluna samideano Santiago Gomis, en Ameriko, Urugvajo, Montevideo, estas pioniro de forta nove vigla movado en Sudameriko. Ni fervore deziras sukceson al la amiko kaj al la samideano por antaŭenigo de nia afero en tiuj simpatie memorataj landoj, kie de antaŭ multaj jaroj katalunoj semis kaj semas por Esperanto.

La Barcelona-Radio estas baldaŭ inaŭguronta multe pli potenca stacion, tre gravan reorganizon. Nia amikino F-ino Castellví kaj nia amiko D-ro. Bartomeu jam parolis al la nova Direktoro por la programoj de la Barcelona-Radio, la eminenta kataluna muzikisto Comelles-Ribó, kiu bonvole akceptis Esperanton. Grava Festo por kaj pri nia kara afero estas okazigota ĉe la nova stacio de la Barcelona-Radio post ĝia inaŭguro. En nia proksima numero eble detaloj certaj estos publikitaj.

Ekzamenoj pri lernado, kapablo kaj profesoreco, en Santa Coloma de Farnés. — Dum nia proksima Kongreso en Majo, ni okazigos ekzamenojn por premio per atesto al la esperantistoj kiuj pruvos tra ekzameno ke ili konas profundete, profunde aŭ profundege la gramatikon kaj la internacian lingvon. Ni, do atentigas ĉiujn kursanojn kaj jam lertajn gesamideanojn, ke ili pretiĝu por atingo de atesto. — Por pruvo de «lernado» de gramatiko kaj Esperanto sufiĉas freŝa kaj konscia lerninteco de la «Gramàtica» (kurs mitĵa) de Pompeu Fabra, kaj de la Zamenhofa Fundamento. Por pruvo de *kapablo* estas ankaŭ necesa la kono de «Esperanta Sintakso» de Paul Fructier. Kaj por pruvo de *profesoreco* estas plie necesa la kono de «Lingvaj Respondoj» de Zamenhof kaj «Converses Filològiques» de Pompeu Fabra. — Bona helpa libro estas la «Gramàtica Raonada d'Esperanto», de F. Pujulà i Vallès, kaj «Curs Pràctic d'Esperanto» de la sama aŭtoro. Ĉiuj tiuj libroj estas nun aĉetebblaj en multaj niaj Grupoj kaj en la librejo Nacional i Estrangera, Rambla Catalunya, 72.

«*Al la Sekretario* de Internaciaj Floraj Ludoj, Creu, 75. — Terrassa — Tre estimata Samideano! — Kiel iama membro de la juĝantaro kaj ankaŭ ĉiama interesiganto de la Floraj Ludoj mi permesas al mi atentigi vin pri unu eble pripensinda novaranĝo. — Estus certe tre ĝojige, se la Florajn Ludojn ĉiufoje vizitus tiu poeto, al kiu estas aljuĝita la Ĉefa Premio kun la rajto elekti la Flor-Reĝinon. Sed nur malofte la premiito havas la monon por pagi la vojaĝon. Se oni povus ĉiufoje doni al la premiito la necesan vojaĝmonon aŭ almenaŭ subvencion kaj se oni povus lin dum lia restado ĉe la Festo honore gastigi ĉe iu samideano en la Festurbo, la Festo por la ĉees-

to de la premiito sendube havus multe pli gravan noton kaj pli grandan efikon. Ekzemple, en unu jaro venus hungara samidean(in)o, en alia jaro brita, en tria jaro germana ktp. — La monon por la subvencio oni povus ricevi per depreno de por 10-20 % de ĉiuj premioj aŭ per kreado de speciala Subvencia Fondo. Se en unu jaro la premiito (eble kataluno mem) rezignus la subvencion ĝi povus esti pligrandigata en alia jaro, kiam la premiito eble estus malproksimeloĝanto, ekz. polo aŭ finno. Kompreneble, la subvencio *ne* estus premio, kaj ĝi estus pagota nur, se la premiito efektive partoprenus la Feston. — Mi mem, se mi gajnus la ĉefan premion, volontege persone vojaĝus al via bela Festo kaj al ĉarma Katalunujo; sed nunjare, ekzemple, mi certe ne povus entrepreni tian vojaĝon sen subvencio, ĉar la financa situacio de miaj negocaj entreprenoj nun estas tre malbona». — J.

Metodo de propagando en la sciencia & teknika gazetaro. — En antaŭa noto pri tiu temo (vid. HEROLDO n-ro 92- 1925), ni proponis metodon por utiligi resumojn de artikoloj redaktitajn en Esperanto. — Per tiu metodo la direktoroj de la Revuoj interŝanĝas tiujn resumojn; tiamaniere ĉiu el ili ricevas la resumojn de ĉiuj samfakaj Revuoj. — *Sed se ekzistas en iu fako Centra internacia organismo: federacio, asocio, oficejo, k. t. p., pli taŭga solvo estas ke ĝi publikigu mem aŭ per kontrakto kun eldonisto la senmankan aron de tiuj Esperanto-resumoj, senditaj al ĝi de ĉiuj samfakaj Revuoj.* — Post kiam la interŝanĝado, pri kiu ni antaŭe parolis, estas organizita kaj montrosian profiton, oni devos klopodi por atingi tiun alcenrigitan publikigadon; ĉar ĝi estos certe realigata en la estonteco, kiam Esperauto estos universale uzata. — Efektive ĝi alportos al ĉiu fakisto eblecon koni, dank' al tiu bibliografio, la verkojn faritajn aŭ komencitajn en ĉiuj landoj rilate al la demandoj, pri kiuj li laboradas; kaj pli ĝenerale li povos konstati la temojn nune plej interesindajn kaj la faritajn progresojn en la tuta mondo. Pro tio, tiu kompleta bibliografia verkaĵo havos multnombrajn legantojn kaj abonantojn, (fakajn bibliotekojn, lernejojn kaj Institutojn); sekve oni trovos facile eldoniston, se la faka centra organismo ne povas eldoni mem tiun gravan verkon. — ROLLET DE L' ISLE. — Ĝenerala Sekretario.

Jen plua Maĵorka urbeto: Benisalem, kie nia kara Bofill ankaŭ efike semis por Esperanto, per sukcesa parolado, kaj gvidaj alparoloj dum la pasinta monato.

Barcelona Esperanto-Societo. Por la 27 de Februaro tiu ĉi nova Societo anoncas eksterordinaran literaturan vesperfeston kiel inaŭguracion de sia agado. Ŝajnas ke la solena kunveno, pri kiu oni disdonos programon ĝustatempe, honoros la altan meriton de Kataluna Antologio per deklamado de ĝiaj plej reliefaj paĝoj. — Al la nova batalanto, al la nova organizaĵo aliĝinta al nia Federacio, ni deziras sukcesan vivon en nia kataluna esperantista movado.

«*Madrid*, la 26an de Januaro de 1926, al S-ro. Jaime Herp, Kasisto de K. E. F. — Tre respektinda samideano: Mi ricevis vian estimatan poŝtkar-

ton kune kun la «Gvidlibro de Mallorca». Ne sole pro tio mi estas devigata montri al vi mian dankemon, sed ankaŭ ĉar kiam mi petis de vi, ke oni sendu al mi la lastan numeron de K. E. (Novembro-December), vi sendis ĝin tuj al mi, kaj ankaŭ mi ricevis kelkajn aliajn numerojn de la gazeto pri-traktantaj la Kongreson de K. E. F. en Palma de Mallorca, kaj la Gvidlibron pri tiu insulo. Tiu-ĉi libro rememoras al mi la vidiindaĵojn de mia lando, kaj montras al miaj amikoj la gravecon de K. E. F., kies sukcesoj kaj tiuj de viaj internaciaj Floraj Ludoj, unikaj en la tuta mondo, estas ĉie konataj. — La legado de K. E. multe interesas min; tial tuj kiam finiĝos la jaro de mia abono, mi repagos tuj mian kotizon por ricevi rajte «Kataluna Esperantisto». — Kun samideana saluto mi restas via tre danke. — A. GIMÉNEZ.»

Ĝefianĉiĝo. — Nia kataluna Esperanto-naĵtingalo F-ino, Palmira Castellví el Barcelona, kun S-ro. Xaver Haider, muzikisto, U. E. A-ano en Mühldorf-Bajerno, Germ.



Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevitajn)

KATALUNA ANTOLOGIO. — Kompilita de Jaume Grau Casas. Barcelona 1925. 416 paĝoj, 22 × 16. Havebla de Komitato por Kataluna Antologio, S-ro. Eduard Capdevila, Carders, 29, Barcelona. Prezo: 12 pesetoj. Aŭfrankite por ĉiuj landoj: 15 pesetoj, 11 sv. fr., 2 dolaroj, 9 ŝilingoj.

Kiom da jaroj la katalunaj esperantistoj bataladis por efektiviĝi la sopiratan revon! Longan tempou kuŝas jam en la eterna ripozo fervoraj samideanoj, kiuj la unuaj bataladis por publikigi nian Antologion. Kiom sopiris al ĝi la karmemora pastro Coll. Kiel ofte li predikis al ni, lernantoj de Esperanto en la Barcelona Universitato, kiom mirigos la mondon la diskonigo de la lingvo de niaj prapatroj, hodiaŭ pli ol iam disvolviĝanta kaj amata. Sed la forto mankis al ĉiu entreprenanto kaj la afero restis en silento ĝis kiam aperis la energia mano, la necedema volo kaj nesuperebla patrujamo de nia kara Jaume. Kun kia fervoro kaj entuziasmo li komencis la kolektadon de la unuaj semoj! Kun kia amo kaj atento li kompletigis la verkon! La plej granda monumento iam farita de la katalunaj esperantistoj al sia gepatra lingvo rapide kreskis, mirinde ellaboriĝis kaj ni ricevis senkomparan juvelon.

Sed kia juvelo, amikoj. El perloj, topazoj, safiroj, rubenoj kaj diamantoj ĝi tuta estas. De la unua ĝis la lasta paĝo oni spiras la spiriton de nia

kataluna lingvo, oni gustumas en ĝi la plej delikatajn paĝojn de niaj verkistoj. La tuta gamo de niaj poetoj sonas en viaj areloj dolĉe, kortuŝe. De la unuaj trobadoroj ĝis la hodiaŭaj famaj Sagarra kaj Russinyol, la plimulto de niaj stilistoj havas lokon en Kataluna Antologio.

La verko enhavas 94 versaĵojn kun 3576 versoj. La kompilinto tradukis 61 versaĵojn kun 1787 versoj; Josep Grau 29 kun 1682; Rosselló 1 kun 46; J. Inglada 1 kun 29; E. Pellicer 1 kun 16 kaj J. Ventura 1 kun 16. Ses tradukintoj entute. La prozo okupas 251 paĝojn, kies tradukon ni ŝuldas; al la kompilinto 159 paĝojn, Ventura 22, Pujulà 17, Pellicer 10, Grau (Josep) 10, Solà 8, Alberich (S) 5, Torrents 5, Torné 4, Capdevila 3, Dalmau (D.) 2, Bremón 2, Guardiet 2, Gili 1, Dalmau (J. M.) 1. Entute 15 tradukintoj.

Stilo, preso, bindo, papero kaj aspekto estas laŭdinda ĉiuflanke. Nepe la verko atingos lokon en la unua vico de niaj plej famaj ĉefverkoj.

Ni, kiel katalunoj kaj esperantistoj, estas fieraj ke ni sukcesis diskonigi tra la tuta mondo la riĉecon de nia lingvo. Al la kompilinto, nia amiko Grau, ni neniel povos pagi la servon faritan al Katalunujo.

Dankon, plej koran dankon Grau. — SALJO

VIKTIMOJ. — Romano el la vivo de siberiaj militkaptitoj originale verkita de Julio Baghy. Eldono de Hungara Esperanto-Instituto. 16×12, 162 paĝoj, Budapeŝt, 1925. Prezo: 25000 hungaraj kronoj.

Ne nur kiel poeto sed ankaŭ kiel prozisto la verkinto de tiu ĉi romano havas specialan kapablon. Lia plumo facile kaj bele disvolvas scenojn el la vivo de militkaptitoj en Siberio. Amo, doloro, altaj pensoj estas ĉarme enkarnigitaj en la diversaj figuroj, kiujn la fantazio kaj propraj travivaĵoj de nia konata Baghy metas sur la scenejo de lia verko. De la komenco ĝis la fino la leganto kun avido kunvivas la tragedie disvolviĝantan romanon.

Se al la diritaj kvalitoj oni aldonas, ke el lingva vidpunkto estas la verko vera juvelo, neniu ja forgesos tuj mendi la libron. — SALJO.

Nekrologo

Nia amiko Pruna sciigis nin pri la morto de la patro de nia ĝentila samideanino Rosa Cortés. Ni esprimas al nia simpatia samcelanino kaj al ŝia familio nian sinceran kondolencon, ankaŭ al nia kara samideano Tomàs Barberà kies patron la morto forprenis.

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

"Kataluna Esperantisto"

ĈIUMONATA 16-PAĜA GAZETO
OFICIALA ORGANO

DE LA

Internaciaj Floraj Ludoj

Plej bonaj verkaĵoj de plej bonaj
aŭtoroj ĉieaj.

Tradicie tre bona laŭ stilo kaj preso.

Jarabono: 6 svisaj frankoj aŭ 1'50 usonaj
dolaroj aŭ egalvaloro efektivebla en
Barcelona.

Adr.: Carrer València, 245-BARCELONA

Ĉiuj gazetoj kiuj bonvolos represi nian anon-
con, rajtos similan pri si, por kio bonvolu sendi
tekston publikigotan.

TAŬGA kaj MALKARA por la LERNANTOJ

Kontraŭ antaŭpago de UNU PESETO
per poŝtmarkoj, ni sendas sor-
timenton da

DEK EKZEMPLEROJ de ESPERANTAJ
GAZETOJ. (ne aktualaj)

ESPERANTO de U. E. A.

ESPERANTO TRIUMFONTA
KATOLIKA MONDO, k. t. p.

Mendoj: J. HERP

Carrer València, 245 - BARCELONA

KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE

JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Prezo: 12 pesetoj. Aŭfrankite: 2 dolaroj, 11 svisaj frankoj aŭ 9 ŝi-
lingoj. En la Iberia duoninsulo 13 pesetoj aŭfrank.

Por mendoj oni turnu sin al S-ro. Eduard Capdevila, str. Car-
ders, 29. Barcelona.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la KATALUNA ANTOLO-
GIO estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperantujo.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan
gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.

18-a Universala Kongreso de Esperanto kaj Internacia Somera Universitato

EDINBURGO — 31 Julio ĝis 7 Aŭgusto 1926 — EDINBURGO

Loka Kongresa Komitato: Hon. Prezidanto: John Merchant. — Prezidanto. W. M. Page, S.S.C. — Vic-Prezidantoj: William Rac, S-ino G. Senior. — Sekretarioj: J. M. Warden, F.F.A., L.K., William Harvey, I.S.O. L.K. — Kasisto: David R. Tullo, S.S.C. — Komitatoj: F-ino. Jan Baird, George Dickinson, David Kennedy, M. A. Robert Stevenson.

Adresoj por leteroj: Sekretarioj, 18-a Kongreso de Esperanto, EDINBURGO, Skotlando.

Aliĝiloj- Disdonotaj pere de la ĉefaj Gazetoj kaj de la Naciaj Asocioj. Kiu ne ricevis ekzempleron, tiu bonvolu peti ĝin rekte de la L.K.K.

Kotizo: Por ĉiu kongresano senescepte: 20 ŝilingoj Britaj = proksimume 20 Ger. or-markoj, 25 Svis. fr., 12 Nederl. guld., 5 Uson dol, oportuna maniero sendi la kotizon, estas per Brita Statbileto por L 1 (currency note, one pound), havebla ĉe bankoj en multaj urboj, kaj sendota per registrita (rekomendita) letero.

Garantia Kapitalo: La L.K.K. zorge penos eviti ian financon deficiton sed, por certigi la financojn, ĉi tiu Kapitalo estas fondita.

Donacoj: La L.K.K. volonte ricevos donacojn por helpi al plena sukceso de la Kongreso.

Blindula Kaso: La L.K.K. akceptas pere de la aliĝiloj, aŭ alimaniere, mondonacojn por ebligi, ke blinduloj partoprenu en la Kongreso.

Loĝado: Sub-Komitato: jam vigle laboras por fari plej moder-prezajn, sed tute kontentigajn, arangojn pri loĝado. Detaloj aperos en estonta Bulteno.

Fakaj Kunvenoj: Organizontoj bonvolu anonci frue siajn dezirojn.

Somera Universitato: La L.K.K. daŭrigas la Someran Universitaton, kaj jam aranĝis fakultatojn pri Folkloro, Lingvistiko, Medecino, kaj Scienco.

Akcepto de Kongresanoj ĉe Britaj havenoj: En posta Bulteno aperos adresoj de U.E.A.-Delegitoj, k.t.p. kiuj jam konsentis akcepti ĉe Britaj havenoj kongresanojn el aliaj landoj. Koncernataj anoj skribu rekte al tiuj adresoj ĝustatempe antaŭ alveno.

Proponoj: La L.K.K. danke ricevos kaj zorge konsideros fruajn proponojn deklami, kanti, ludi, k.t.p. ĉe Kongresaj Koncertoj.